# ATEISMO

ESPERANTO

## Organo de ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

januaro 1990

vol. 2, n-ro 1 (4)

eldonata trifoje jare

# LA CELOJ
# DE ATEO

# ATEISTA TUTMONDA
# ESPERANTISTA-ORGANIZO

1. *Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.*

2. *Disvastigi Esperanton inter ateistoj.*

3. *Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neutralajn Esperanto-grupojn.*

4. *Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.*

5. *Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.*

6. *Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.*

7. *Malkateni la mensojn!*

# ENHAVO

*de la estraranoj* . . . .

**Mesaĝo de la Prezidanto kaj Korekto** . . . . . . . . . . . . 2

**ATEO Kunvenis en Brajtono** . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3

*pri politikaj kaj sociaj rilatoj de religio* . . . .

**Dio Estas Ĉie per Radio**, de Annie Nakao . . . . . . . . . . . 4
resume tradukis R. Dumain

**Malkaŝe pri Religio**, tradukis V. Tobiasek . . . . . . . . . . . 5

**Eklezia Imposto**, de A. Horvat, trad. Antonin Podhrasky . . . 8

*pri rilatoj inter ateistoj kaj religio* . . . .

**Ateismo kaj Toleremo**, de J. Deker . . . . . . . . . . . . . . . 8

**Tri Reagoj: al A. Ŝalamon & O. Pavlov**. . . . . . . . . . . . 9
de Rejna de Jong, Karlo Kosta kaj Ralph Dumain

*pri filozofiaj problemoj de ateismo* . . . .

**Pri la Filozofio de Todd Moody**, de Pierre Savoie . . . . . . 11

**Dubo kaj Ateismo**, de Evlogi Dankov, trad. O. Cankova . . . 12

**Postkomentaro al Dankov**, de Ralph Dumain. . . . . . . . . . 13

**Kio Estas dio, aŭ Dio?**, de May Bijleveld . . . . . . . . . . . 14

*pri historio de religio* . . . .

**Kiu Konas la Esenojn?**, de Ernst Diedrich . . . . . . . . . . . 16

*pri la ateista movado* . . . .

**Pri la Internacia Ligo de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj** . . . . 18
de Walter Schmidt, tradukis Maria Merla

. . . *kaj nia rolo*. . . .

**Pri ATEO en al Monda Ateista Movado**. . . . . . . . . . . . 19

*anoncoj kaj reklamoj* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 20
**Anonco:** **Alvoko al Verkado pri Specialaj Temoj**
Reklamoj: *Laŭte!* kaj *Internaciisto*
**Anonco:** **Artikoloj, Kartunoj kaj Sercoj por Venontaj Numeroj**

## Mesaĝo de la Prezidanto

Estraranoj Ges-roj Massen raportos sube pri la kunveno de ATEO ĉe la Universala Kongreso kaj aliaj organizaj novaĵoj. Jen kelkaj miaj ĝeneralaj komentoj responde al artikoloj kaj leteroj de niaj membroj.

Okazas multa filozofia debatado pri la konceptoj de materio kaj materiismo kaj ĉu moderna fiziko (aparte kvantumteorio) iel senvalidigas materiismon aŭ proksimiĝas al religio aŭ mistikismo. Mi opinias, ke definitive respondis ĉi tiujn demandojn V.I. Lenin en lia libro *Materiismo kaj Empiri-Kritikismo*. Bonvolu konsulti tiun libron antaŭ ol oni daŭrigu la debaton.

Mi volas emfazi, ke male ol kelkaj aliaj niaspecaj asocioj, ĉe ATEO *ne* ekzistas oficiala filozofio aŭ metafiziko aŭ oficialaj difinoj de religio, ateismo, liberpensismo, aŭ aliaj konceptoj. La filozofia nebuleco de ateismaj, liberpensismaj, kaj humanismaj movadoj estas samtempe ties forto kaj malforto. Ĉiu rajtas havi kaj esprimi proprajn konceptojn, se tiu ĝenerale aprobas la celojn de ATEO.

Plue, ATEO estas sufiĉe politike neŭtrala. Ĉiu havas proprajn interesojn pri ateismo kaj religio. Iuj preferas filozofiajn demandojn, aliaj politikajn demandojn, aliaj historiajn aŭ aktualajn informojn el diversaj landoj, ktp. Sed ja okazos diskutado de ĉiaj demandoj, inkluzive de politikaj. Malpermeso tiurilate estus malakceptebla cenzurado kaj kaŝa ideologia manipulado kian mi jam sufiĉe spertis inter Usonaj "liberpensuloj" kaj "humanistoj."

Malofte troviĝas sufiĉa spaco en *ATEISMO* por publikigo de miaj propraj verkoj. Do, por via intereso mi ĉi tie citas lastatempe publikigitajn miajn verkojn en aliaj revuoj kiuj iel pritraktas ateismajn, religiajn kaj filozofiajn demandojn: "Dialektika materiismo kaj burĝa ateismo" (*Internaciisto*, juli-aŭgusto 1989, suplemento, p. 3-4) [unua artikolo en serio]; recenzo de *Rekta Pensado* de Evaldo Pauli (*La Kancerkliniko*, #50, aprilo-junio 1989, p. 18-20); recenzo de *Esperanto: Learning and Using the International Language [Esperanto: Lernado kaj Uzado de la Internacia Lingvo]* de David Richardson (*La Kancerkliniko*, #50, aprilo-junio 1989, p. 21); poemo "Immanuel Kant" (*La Kancerkliniko*, #49, januaro-marto 1989, p. 7).

## Korekto, de la Ĉefredaktoro

Laŭ peto de la verkinto, mi mencias ke la aŭtoro de la artikolo "Kelkaj Komentoj pri Religio en Pollando" (*ATEISMO 1:2*, januaro 1989, p. 10) estas Andrzej Broda de Pollando. Mi kutime aperigas en *ATEISMO* komentojn el leteroj anonime, parte por protekti la korespondintojn se necesas. La komentaro pri la situacio en Pollando, kiun mi ĉerpis el letero de S-ro Broda, estis tiom ampleksa, ke mi decidis fari el lia letero tutan artikolon. Mi ne havis tempon peti permeson de li antaŭ eldono de tiu numero, do mi konstruis anoniman artikolon. S-ro Broda ne intencas kaŝi siajn pensojn aŭ identecon.

# ATEO Kunvenis en Brajtono

de Minerva Massen (Usono), Vic-Prezidantino

Trifoje jam nia nova faka asocio ATEO kunvenis oficiale kadre de Universala Kongreso de UEA. Ĉi-jare en Brajtono, Britio, okazis la tria kunveno, mardon je la unua de aŭgusto. Partoprenis proksimume 30 personoj, plejmulte abonantoj aŭ membroj de ATEO. Aliaj venis por lerni pri ni kaj ili montris intereson pri ateismo. Homoj ĉeestantaj venis el Belgio, Britio, Germanio, Israelo, Pollando, Svedio, kaj kompreneble el Usono. Ĉiuj sin prezentis.

La unua parto de la konveno koncernis administrajn aferojn, laŭ la tagordo. Prezidanto Ralph Dumain ne povis ĉeesti la kongreson, do vicprezidantino Minerva Massen prezidis. Minerva informis pri la stato de ATEO, aparte pri nia peticio fariĝi "neneŭtrala asocio en kunlaboro kun UEA," t.e. en la sama kategorio kiel ses religiaj organizoj listigitaj en la Jarlibro. Post interŝanĝado de multaj leteroj, ŝajnas ke la afero eble estos decidita je la fino de la semajno ĉe kunveno de la Komitato.

La adresaro de ATEO pligrandiĝas. Je januaro 1989, la adresaro inkluzivis 191 personojn de 33 landoj. En aŭgusto la adresaro enhavis 216 personojn de 37 landoj. Ankaŭ la landlistoj kreskas, kiu fakto ebligas ateismajn kunvenojn en iuj landoj.

Oni diskutis la neceson de la pligrandigo de la estraro. La bezono por kunlaborantaj redaktoroj kiuj kolektus artikolojn por revuo *ATEISMO* estis anoncita. Neniu volontis por tiu posteno. La ĉeestantoj voĉdonis, ke la jamaj estraranoj daŭru en siaj postenoj dum la sekvonta jaro ĝis la kunveno ĉe Kubo.

Estis decido daŭrigi la abonkoston de US$8.00 por *ATEISMO*, kaj UEA konsilis daŭrigon de la sama interŝanĝo de 16 gld.

La dua parto de la kunveno konsistis el vigla diskutado pri landaj aferoj, religiaj problemoj, ktp. Interalie, Josef Murjan el Israelo, Komitatano de UEA, partoprenis la diskutadon. Oni parolis pri la altrudo de religio en ŝtataj aferoj, pri la difino de terminoj kiaj humanismo, Dio, agnostikismo, kaj kiel tiuj ideoj efikas nin. Ĉi tiu interŝanĝo de ideoj daŭris dum unu horo, post kiam ni devis lasi la ĉambron por ke alia grupo povu kunveni tie.

Ni ne povis lerni ĉe Brajtono ĉu la Komitato aprobis nian peticion fariĝi neneŭtrala asocio. Eble la komitato ne povas agi pri ĝi, ĉar estis tro multe da pli gravaj aferoj ĉe la Kongreso. Je 1989-08-18, ni skribis al la Ĝenerala Direktoro de UEA kaj demandis: ĉu la Komitato decidis pri nia peticio; kaj, se ne, kial - kaj kian agadon ATEO devas fari por akiri la deziratan rangon? Li ne respondis. Je 1989-11-13, la usona ĉefdelegito de UEA, S-ro Harmon, skribis al la Ĝenerala Direktoro, kun kopio de nia letero, kaj petis ke la ĜD respondus al ni. Denove, li ne respondis. La sekvonta ago: Prezidanto Dumain skribos al Prezidanto John Wells de UEA pri la afero. ATEO rajtas fariĝi "neneŭtrala asocio kunlaboranta kun UEA", kiel ses religiaj organizoj; kaj **ni atingos tiun celon!**

Ĝis la revido en Havano, Kubo, je 14-21 julio 1990!

# Dio Estas Ĉie per Radio: Politiko de la Kristana Dekstrularo Atingas la Trian Mondon

de Annie Nakao [el *San Francisco Examiner*, 1989.07.03, p. A-2], resume tradukis Ralph Dumain (Usono)

En arbaroj de Ekvadoro, indianoj kiuj parolas la Keĉuan lingvon fingrofrapetas laŭ milda rokmuziko de kristana muzikprogramo importita de urbo San Francisco. En la norda hemisfero, la Kristana Disaŭdiga Reto de la familio Concord urĝas al bezonata financa "miraklo" provizota de la publiko. Malgraŭ la skandaloj de evangeliistoj Jimmy Swaggart kaj Jim kaj Tammy Faye Bakker, la "elektronika eklezio," la plurmiliarddolara religia telekomunikila industrio, prosperas. "Oni povas veturi de Novjorko al Kalifornio kaj aŭskulti kristanajn radiostaciojn la tutan vojon," diris Ben Armstrong, direktoro de la Tutlandaj Religiaj Dissendantoj.

## Religia Programado Kreskas

Preskau 25% de la 1411 televidaj stacioj de Usono provizas plentagan religian programadon, 30%-a salto super la statistiko de 1988. Mankas en tiu kalkulo la tri religiaj televidretoj, inkluzive de la Kristana Dissendo-Reto de Pat Robertson kaj la centoj da stacioj kiuj provizas kelkan religian programadon.

El la 10546 radiostacioj de la lando, 1285, t.e. 14%, estas kristanaj stacioj; t.e. 7% pli ol en 1988.

Tio estas trivialaĵo kompare al la tutmonda reto de evangeliado al triamondaj landoj per mallongonda radio. Ekzemple, alte en la Andojmontoj, radiostacio HCJB disaŭdigas al 80% de la mondo dum 24 horoj de ĉiu tago.

## Al Ĉiuj Homoj

Per koneksoj kun aliaj retoj, HCJB ĵuras, ke ĝi provizos, antaŭ la jaro 2000, la Evangelion de Jesuo Kristo al ĉiu persono sur la tero en komprenata lingvo. La elektronikemaj evangeliistoj jam "progresus" eĉ plu, se ne okazis la lastatempaj skandaloj, diris sociologo Jeffrey Hadden. Sed Sara Diamond, verkinto de la libro ***Spirita Milito: La Politiko de la Kristana Dekstrularo***, asertis, ke la skandaloj obskuras pli profundan problemon: la engaĝadon de la kristana dekstrularo en enlandaj kaj fremdlandaj politikaj aferoj.

Diamond diris, ke religia programado ne estas nur komerco kaj ekspluatado, sed precipe propagandado. Per televido, la evangeliistoj inundas la publikon per sia teologia-politika vidpunkto. Ĉu jes aŭ ne rekrutiĝas novaj religiaj kredantoj, religia programado motivigas la jamajn kredantojn.

## Konservativa Publiko

Religiaj amaskomunikiloj promocias la politikajn programojn de la kristanaj dekstruloj, ekz. la kontraŭaborta movado kaj ĝia terorista frakcio, la movado por preĝado en publikaj lernejoj, kaj opoziciado al sekulara humanismo. Kompreneble, "laŭ la instruoj de la Biblio."

Laŭ Diamond, la plejmulto de religiaj programoj propagandas malrekte kaj kreas ideologian fonon, ĝeneralan mondbildon kun ŝlosilaj konceptoj, ekz. la supereco de la tradicia familio kontraŭ samseksemo, laŭmerita senrajtigo de tiuj kiuj ne

kongruas laŭ tiu ŝablono. La alia konstanta temo estas la supereco de Usono, ke iu ajn lando kiu ne obeas la fremdlandan politikon de Usono estas komunisma.

Paul Burke, redaktoro por bulteno de la Kalifornia Ekumena Konsilantaro, kritikis la agadon de la televidaj evangeliistoj en Centra Ameriko. Ili intencas, ne disvastigi religion, sed influi la politikon, kaj batali por Usono kontraŭ "komunismo." Tiuj evangeliistoj maltrankvilige sukcesas, eĉ konkurencas kun katolikaj instancoj. Laŭ unu kalkulo, evangeliistoj konsistigas 25% de la loĝantaro de Gvatemalo.

Diamond kaj Burke insistas, ke evangeliista propagandado malhelpas pacagadon de pastoroj en Latinameriko kaj la disvastigon de la liberiga teologio. Eĉ pli abomeninde estas evangeliista subteno al subpremantaj registaroj. Ekzemple, Swaggart kunvenis kun la dekstrula prezidento de Ĉilio, Augusto Pinochet. Dum multaj evitas ligojn kun Sudafriko pro ties rasapartiga sistemo, la Triunuo-Dissendo-Reto konstruas la unuan afrikan televidan stacion en la Sudafrika "hejmlando" (koncentreja teritorio por negroj) Ciskei. La sama Reto negocas kun la Sudafrika registaro pri konstruo de dua stacio.

## Malkaŝe pri Religio

Tradukita de Vaclav Tobiasek (Ĉeĥoslovakio)

El Agrikultura ĵurnalo eldonita en la urbo Brno, 1989-04-04. Parolas Institutestro por esploro de socia konscio kaj scienca ateismo de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj (ĈSAS), docento D-ro Ivan Hodovsky, D-roSC.

Ankoraŭ en la 50-aj jaroj religio estis alvicigata al postvivaĵoj kiuj malaperos en la daŭro de du aŭ tri generacioj. La tempo antaŭenpaŝis kaj tiu ĉi opinio montriĝis tre iluzia. La religio restas konstanta parto de nia socia vivo, tamen ĉe ni la libero de konfesio estas garantiita per ĈS-a konstitucio. Ĉirkaŭ religiajn demandojn oni iom iradas piedpinte kaj pro manko de informoj poste naskiĝas la plej diversaj famoj kaj konjektoj. Pro tio mi kunvenis kun Institutestro por esploro de socia konscio kaj scienca ateismo de ĈSAS en Brno, docento PhD-ro Ivan Hodovsky, D-roSC, por ke ni traparolu ĉi tiujn problemojn.

Redaktoro Jan Bauer

* * * * *

**K-do direktoro, plej baldaŭ iom prezentu vian instituton al publiko!**

**Per kio vi okupiĝas?**

Kiel jam la titolo de instituto mem sufloras, ni okupiĝas ne nur pri la problemaro de ateismo, sed ankaŭ pri la esploro de etiko kaj iuj aliaj pli vastaj demandoj kiuj koncernas al socia konscio. Pro tio ankaŭ en nia instituto funkcias la sekcio de scienca ateismo, la sekcio de psikologio kaj sociologio kaj ankaŭ la sekcio de fundamentoj de etiko. Speciale gravas la problemaro de etiko, ĉar nuntempe nenia nia socioscienca laboro okupiĝas senĉese pri ĝi kaj ĉe tio la moralaj problemoj montriĝas kiel eksterordinare aktualaj. Mi opinias, ke la plej grava parto de nia laboro estas fari sociologiajn kaj psikologiajn esplorojn kiuj informas nin, kun iuj tipoj de tutmondaj opinioj ĉi tie ni renkontiĝadas ĉe konscio de diversaj generaciaj kaj socialprofesiaj grupoj

de loĝantaro. Nia instituto ĉe tio efektivigas la esplorojn unue memstare, due kunlaboras kun Instituto por Esploro de Publika Opiniado ĉe Federala Statistika Ofico kaj kun Instituto por Filozofio kaj Sociologio de ĈSAS en Prago. Ĉe la esploroj ni provas koordini la sociologian kaj psikologian aliron, ĉar nura sociologia esploro estas iam sufiĉe skema pro sia malpli alta enhaveco. Ĉefe tiu ĉi psikologia esploro ebligas al ni kompreni kondutadon de homo kiel individuo.

**Ĉu vi povas diri, fundamente de viaj esploroj, kiom da kredantaro vivas ĉe ni rilate tutŝtatan nombron da loĝantaro?**

Ni opinias, ke la tutŝtata nombro da kredantaro estas preskaŭ 30 procentoj. Memkompreneble oni devas konscii la treegajn teritoriajn diferencojn kiuj ekzistas en Ĉeĥoslovakio. Ekz. en Norda kaj Okcidenta Bohenioj loĝas proksimume 10 procentoj da kredantaro. Videble pli multe da kredantaro loĝas en moraviaj regionoj kaj precipe en Slovakio. Sed ankaŭ en Moravio ekzistas videblaj diferencoj inter unuopaj distriktoj, ekz. en la teritorio Znojmo loĝas pli ol 20 procentoj da kredantaro, sed en la distriktoj Hodonin, Gottwaldov kaj Zdar nad Sazavou plue daŭras la fortaj religiaj tradicioj kaj tie ĉi loĝas pli ol 50 procentoj da kredantaro. En Ĉeĥoslovakio, dum la lastaj 40 jaroj, okazadis sufiĉe esprimplenaj ŝanĝoj en religiaj sentoj de la loĝantaro.

En la 60-aj kaj poste en la 70-aj jaroj, ni notis du ampleksajn ondojn da malleviĝo de tuta kvanto da kredantaro. Nuntempe (temas proksimume pri la lastaj 10 jaroj), ni povas paroli pri stabiligo de religio. Ni scias de niaj esploroj, ke ĉiam ne eblas identigi la personojn kredantajn kaj la personojn nure religie kondutantajn. La plej precizan bildeton pri situacio (inklino al religio) prezentas ekzemple la sumoj da baptitaj infanoj, sed la sumoj da eklezaj geedziĝoj kaj precipe eklezaj sepultoj jam misinformas pro sia relative granda kvanto.

**Kian rilaton al religio havas nia juna generacio?**

La juna generacio en Ĉeĥoslovakio estas religie orientigata nur en malgranda kvanto, sed denove montriĝas videblaj diferencoj inter unuopaj regionoj. En ili kompreneble efikas ankaŭ la diferencaj religiaj tradicioj, transdonataj de generacio al generacio, kaj religia edukado, ktp. Ĉe ni ekzistas la instruado de religio, sed la intereso estas sufiĉe malgranda. Nur antaŭnelonge reviviĝis la nova parta intereso influita per infanaj aliĝiloj al religio. Antaŭe la infanoj aliĝadis al religio pere de lernejoj, sed nun ili aliĝadas rekte pere de paroĥestraj domoj. Ĉi tiu nova maniero estis efektivigita por kontentigi la bezonojn de kredantaro.

**Ĉu influas diversaj formoj de politikaj protestoj la religiajn opiniojn de kredantaro?**

Mi dirus, ke diversaj politikaj sintenoj (aktivecoj) ne influas senpere religiajn opiniojn de kredantaro, sed ke la religio mem signifas tre senteman fenomenon kiun influas politika vivo de socio. Ĉiu politikoekonomia krizo preskaŭ ĉiam manifestiĝas per pli forta religia aktiveco. En krizaj periodoj, kiuj estas akompanataj per moralaj malcertecoj, povas homoj korligiĝi al religio kiel al io pozitiva, ili povas serĉi en ĝi la

konsolon - per la religio ili povas oponi al homa interforlogiĝo. Sed povas aperi iuj individuoj por utiligi (aŭ misuzi) siajn vizitojn al preĝejoj kaj ekleziaj ceremonioj por iuj formoj de politikaj nekonsentoj, sed ĉe tiuj ĉi situacioj, oni ne renkontiĝas kun efektivaj religiaj ideoj kaj pro tio plimulto da kredantoj rifuzas la personojn uzantajn ĉi tiujn manierojn. La kredantoj ne envicigas ilin inter siajn kunkredanojn.

**Vi menciis pri tio, ke nuntempe ni povas paroli pri certa stabiligo de religio. Ĉu vi povas plu klarigi tion?**

Iam oni propagandis tezon, ke malfortiĝas la influo de religio kaj ke ĝi baldaŭ malaperos el vivo de socio kiel postvivaĵo. Sed ĉi tiu tezo montriĝis erara. La homa opinio direktiĝas de pli komplikaj meĥanikaĵoj. Ĝi dependas ja de formado de sociaj interrilatoj, sed ĝi funkcias ankaŭ kiel opinio aŭ individua aŭ grupa, kaj gravajn rolojn ludas kaj prezentas tradicioj kaj edukadoj en familioj. Pro tio ni nun staras antaŭ tasko elkrei kvalite alian bildon pri religio, kiu pli similus al realeco. Ni opinias, ke religio ne malaperas el nia vivo, sed plue ĝi funkcios dum la tuta periodo de konstruado de socialismo.

**Proksimume dum duono de la 80-aj jaroj, ni fariĝis atestantoj de plifortiĝinta religia aktiveco. Unue ĝi okazis ĉe la 1,100-a mortodatreveno de kredanoncanto Metodo, due ĉe la ĉiujaraj pilgrimadoj en Levoĉa en orienta Slovakio, trie ĉe la deklamo de la dekjara preparado de sanktovojteĥa milenio kiu okazos en jaro 1997. Ĉu influos tiu ĉi aktiveco sentojn de loĝantaro?**

Antaŭ ĉio mi devas akcenti, ke ni rimarkas ŝanĝitajn vidaĵojn je religio. Antaŭ pli ol 20 jaroj, granda parto de loĝantaro akceptis la religion kiel postvivaĵon. Nuntempe homoj ŝatas ĝin (kiel pozitivan fenomenon). Ili rememorigadas ĝian signifon por la morala vivo, ĝian influon por stabiligo de familio, por edukado de infanoj, por kulturkreado, por estetika sento, ktp. Ne estus saĝe rifuzi tiujn ĉi ŝanĝitajn vidaĵojn je religio. Tamen jesigi pozitivajn valorojn de religio ankoraŭ aŭtomate ne signifas adopti religiajn kredojn.

Kune ni devas esplori ankaŭ kreskon de petoj pri religia literaturo, pri la Biblio, ĉar al ni mankas la informoj. Eĉ mezlernejaj kaj altlernejaj lernaĵoj malhavas la informojn pri religio. Mi mencias, ke tio estas eraro. Tamen la kristaneco apartenas al fundamentaj radikoj de eŭropa kulturo kaj klereco, kaj ankaŭ nuntempe ne eblas eksigi ĝin. Ja tie, kie mankas la seriozaj informoj pri ĝi, tie oni instigas vivspacon por diversaj superstiĉoj kaj mitoj, tie ankaŭ plifortiĝas la pseŭdoreligiaj fenomenoj kiel sektemo, malklarigo, mistifikado. Pro tio gravas ne rifuzi la religiajn temojn, sed male diskuti ilin malkaŝe kaj ne misinforme, ĉar la religio kreas realan parton de socia vivo en socialismo.

## **Eklezia Imposto**, de A. Horvat, el ĵurnalo *Vespera Prago*
tradukis Antonin Podhrasky (Ĉeĥoslovakio)

Propagandado de religia ideologio, predikado de "Dia vorto," kaj zorgado de pastraro pri "eterna savo" de kredantoj, ĉi ĉio postulas nemalgrandan materialan sekuron. Grava rimedo por tio en multaj landoj estas ekleziaj impostoj, kiuj estas eldevigeblaj de kredantoj per ŝtata potenco.

Deveno de ekleziaj impostoj troviĝas jam en la 19-a jarcento, kiam kresko de financaj bezonoj de eklezioj ne kontentigeblis per ekzistantaj ekleziaj depagoj. Eklezia imposto estas difinita monsumo, kiun eklezioj kaj religiaj societoj enkasigas de kredantoj per ŝtata aparato.

Pagado de impostoj neniam apartenis al homaj ĝojoj. Pri problemo de pagado de eklezia imposto oni ofte parolas. Ekzemple, en Aŭstrio en 1988, episkopoj akuzis pli ol 11000 katolikulojn pro nepago de tiu imposto. Krom tio forlasis la eklezion 3833 kredantoj. La episkopio en Gratz domaĝis je pli ol 11 milionoj da ŝilingoj. Ĉar ĉiu katolika episkopio okupas spertajn juĝistojn, plendoj ĉe lokaj tribunaloj pritraktiĝas tre rapide. En tiuj tribunaloj kutime mankas "kristana amo." Oni raportas, ke se eklezia imposto estus libervola, pagus proksimume triono da katolikuloj.

Sed pagado de impostoj ne estas la sola motivo pro kiu kredantoj forlasas eklezioj n. Nova postmilita rekordo de forlasado de eklezioj en Aŭstrio estis notita en 1988. Jen la statistiko de forlasintoj: 38368 kredantoj el la katolika eklezio, 2992 el la evangelia eklezio, kaj 152 el aliaj eklezioj. Dum sepjara periodo temas pri 223604 katolikuloj, 15014 evangeliuloj, kaj 2337 ceteraj.

En Ĉeĥoslovakio kredantoj ĉesis pagi ekleziajn impostojn jam en 1918. Eklezioj rajtas enkasigi nur libervolajn pagojn. Salajrojn de pastoroj pagas la ŝtato.

---

## **Ateismo kaj Toleremo**, de J. Deker (Mauritius)

Por multaj ateistoj el okcidenta Eŭropo, ateismo kaj toleremo estas kunaj, ĉar de longe ateismo estas larĝe disvastigata, de la komenco de la jarcento, eĉ antaŭe. Konsekvence oni forgesas ke en nove evoluintaj landoj, tio ne estas tiom evidenta. Ju pli ĵusa estas la liberigo de la trudoj de la religioj, des pli la afero estas ankoraŭ konflikta.

Tamen ni ateistoj ne devas forgesi ke toleremo estas ligita al libereco kaj ateismo. Ni ateistoj kiuj liberiĝis el la diaj, pli ekzakte el la ekleziaj trudoj, ni havas nenion por trudi. Por ni estas evidente ke ne ekzistas iaj ajn dioj: silento de tiuj dioj kiujn neniu vidis, estas nenia pruvo pri la ekzisto de tiuj estaĵoj nebulaj, kiuj neniun kaj nenion helpas nek klarigas. Nin ne konfuzu kun klarigoj la konfuzaj kaj infanaj rakontoj de la pastroj. Tio estas nia propra konvinko, sed estas aliaj kiuj ne samopinias kun ni, kiuj aniĝas al kredoj plej diversaj kaj plej neversimilaj; estas ilia rajto. Ili rajtas kredi tion kio plaĉas al ili, kaj ni ne rajtas trudi nian nekredon. Nia celo estas kunveni inter ni por pliprofundigi niajn sciojn, por defendi nian nekredon, kaj ĉefe por helpi al la

junuloj kiuj deziras liberiĝi el religioj kaj renkontas malfacilaĵojn survoje. Estas tro multe da homoj inter ni kiuj estis edukitaj en religioj, kaj kiam ili fariĝas adoleskoj, aŭ pli malfrue, multe hezitas, pripensas, serĉas, antaŭ fariĝi kapablaj liberigi sin el religioj. Tiuj homoj bezonas helpon. Ne tiuj kiuj havas nenian demandon kaj tute simple kredas. Kial oni persekutu tiujn homojn? Ili kredas, fina punkto. Ne estas malforto niaflanke. Kiam ni havas okazon diskuti pri religioj, ni diskutas tute simple, klarigante kial ni ne kredas, kia estas nia vidpunkto, ke ni estas raciistoj, ktp. ... Ni firme malvolvas niajn argumentojn sen provi trudi ion ajn al ili.

Estas eraro de komunistoj, kaj kelkaj ateistoj provi trudi sendiecon. Tiom longe kiom la religianoj ne trudas al ni iliajn kredojn kaj vivmanierojn, ne gravas ke ili kredu eĉ al la plej absurdaj kredoj. Niaj konvinkoj estas ateismaj, ni agnoskas ke ni povus erari sed necesus ke oni demonstru al ni niajn erarojn, kaj tie komencas la malfacilaĵoj. Nun la dikredantoj ne havas la plej etan pruvon pri la ekzisto de dioj, sed ni ne havas ankaŭ pruvon de neekzisto de io ajn kiu similus al dioj, kvankam tiu neekzisto estas tre probabla. La franca biologo-verkisto, Jean Rostand, skribis en diversaj libroj ke li havas skrupulojn partopreni la detruon de religia sento ĉe juna homo. Mi ne havas tiun skrupulon; mi konsideras ke ĉiu devas esti konscia pri la diversaj vidpunktoj; poste li-ŝi tute libere elektos sian propran vojon. La fakto ke iu demandas pruvas ke tiu ne blinde kredas.

Ni havas nenion por timi, la disvolvigo de sciencoj kaj popolinstruado malpliigas la nombron da dikredantoj. La nescio estas la fundo de religioj. Ja ni scias ke la bazo de religioj ne estas la racio sed la emocioj kaj sentimentoj. Sed pli kaj pli homoj liberiĝas el la timoj kaj scias diferencigi inter sentimentoj kaj racio. Tial la religioj evoluas, ekzemple nun katolika religio adoptis regulojn de toleremo kiujn ĝi ne havis antaŭ 200 jaroj kiam ĝi mortigis la ateistojn. Kompreneble estas ankoraŭ malfruo en aliaj religioj kiel islamo kiu ĉiam vivas en mezepoka civilizo kaj etoso. Ili estas ĉiam pretaj batali kontraŭ aliaj religioj kiel katolikismo en Libano, Judismo en Israelo, Hinduismo en Hindio, kaj kompreneble kontraŭ ateismo ĉie (afero Ruŝdi). Sed ankaŭ tio evoluos, kompreneble evoluo estas malrapida; ĝi postulas en tiu kazo klerigadon de la popolo.

Konklude, ni ateistoj estu toleremaj, ni havas nenion trudendan.

## Tri Reagoj: al A. Ŝalamon & O. Pavlov

**1. Pri Laboro**, de Rejna de Jong (Nederlando)

Instigite de la bonega artikolo de O. Pavlov (*ATEISMO 1:3*), mi relegis la "Leĝoj por Homaro" de A. Ŝalamon (*ATEISMO 1:1*). Rilate al la alineo pri "laboro" mi volas averti, ke oni ne "diigu" la laboron. En antaŭa tempo oni jam faris tion, bezonante laborsklavoj por la kreskanta industrio. En multaj hejmoj de simplaj laboristoj - ankaŭ en mia gepatra - pendis sentenco, kiu glorigas la laboron. La mastroj man-enmane kun la kristana eklezio trudis ĝin al la laboristoj kiel moralan, sanktan devon, evidente por iliaj propraj poŝoj!

Laboro certe estas grava por ĉiu homo kaj necesa por la socio. Sed oni nepre atentu la kvanton kaj la specon de laboro! Tro da laboro rezultigas tro da varoj, senlaborecon kaj mizeron ĝuste por la laboristoj.

Kaj en la nuntempo oni produktas multegajn varojn tute senbezonajn, sensencajn, eĉ foje malutilajn al la tuta homaro. Homo, kiu preferas senlaborecon ol laboro en tiaj entreprenoj, meritas respekton; oni ne uzu la vorton "parazito" senpripense kaj sendistinge! Cetere oni ne vivas por labori, sed oni laboras por povi vivi.

**2. Reage al O. Pavlov**, de Karlo Kosta (Hispanio)

La evoluo de popoloj ŝanĝas, eĉ renversas, ideojn kaj politikojn. En okcidentaj landoj religiaj homoj ne suferas diskriminacion, sed ateistoj, ofte jes. Ŝtatoj subtenas ekleziojn; militema ateismo ne ekzistas. Religiuloj kaj ateistoj pace kunvivas. La plej toleremaj, eĉ kompatemaj, estas tiuj kiuj ne ĉeestas diservojn.

Ankaŭ en latinaj landoj la historio estas ligita al religiaj luktoj, krucmilitoj, inkvizicioj. Tion oni ne povas nei, do historiaj verkoj de ĉiuj landoj devas informi pri la efektiva socia rolo de religioj.

Certe la homaro profitas ke la homoj pensas, sentas, kaj kredas malsame. Ankaŭ por scienca ateismo tre utilas disvolvi klarecon kaj konservi ekvilibron inter socia intereso kaj individua mensa libero. Ateisma filozofio estas la sama en ĉiuj landoj. Eble la individuaj mensoj bezonas ŝanĝojn, sed kiel diris Bertrand Russell, "oni ĉiam povas agi modere, kvankam tio estas iomete pli longdaŭra."

**3. Reage al O. Pavlov**, de Ralph Dumain (Usono)

Pavlov diras: "Oni provis priskribi rusan historion sen la kristanismo, sen ĝia progresa socia rolo ... ĉu iu popolo povas normale ekzisti senhistorie, sen sia socia memoro?" Ne, sed mi ne povas kredi, ke kristanismo iam ajn ludis progreseman rolon. Plue, tiu diraĵo kulpas pro grandrusa ŝovinismo, kaj flankenŝovas kaj insultas la religiajn minoritatojn de Sovetunio, aparte la islamanojn kaj judojn. La naŭza fanfaronado de Gorbaĉov pri mil jaroj da kristanismo silentas pri la fakto, ke temas ankaŭ pri mil jaroj da antisemitismo. Pli taŭgus, ke Gorbaĉov publike pripentu la antisemitismajn krimojn de carismo kaj stalinismo.

Pri moralaj problemoj, Pavlov skribas: "Kaj ĉu nekompatema ateisto estas pli bona ol kompatema kredulo?" Ne, sed tio estas falsa demando. Temas ne pri moraleco de iu aŭ alia persono, sed pri la ĝeneralaj sociaj efikoj de religio, ekz. (a) malracia sinpravigilo por barbareco, (b) falsigo de la realo, kio konfuzas kaj bremsas progreson ĉiaspecan. Jen la plej konciza respondo al la demando "Kial la kredo je Dio estas malbona kaj ateismo estas nia nura vojo." Pavlov jam scias ke Lenin polemikis kontraŭ religio ne por forigi homajn rajtojn aŭ kalumnii individuojn, sed pro la ĝeneralaj ideologiaj kaj sociaj efikoj de religio.

Pri la misfaroj de la militanta ateismo de la 1920-30aj jaroj, mi konsentas, sed ja temas pri stalinismo, kies pensmaniero havas nenion komunan kun Marks, eĉ ne kun Lenin. Stalin ne estis dialektika pensanto, sed metafizikaĉa pensanto. Ni ne bezonas novan koncepton de humanismo; ni bezonas simple humanismon.

La nuna toleremo respegulas malrigidiĝon dankon al la glasnosto. Glasnosto estas bonega afero. Tamen, senprincipa oportunismo estas la renversa flanko de senkompata dogmismo sur la sama monero, kaj stalinistoj kaj socialdemokratoj estas spiritaj fratoj.

# Pri la Filozofio de Todd Moody

de Pierre Savoie (Kanado)

Mi malkonsentas je pluraj punktoj la artikolon de Todd Moody (*ATEISMO 1:3*). Li mencias, ke ne ekzistas multe da diferenco inter religio kaj fiziko, kaj ke tiuj ĉi diferenciĝas nur per "la metodoj por malkaŝi la kaŝitan ecojn de la universo." Li pensas, ke parto de fiziko, ekzemple la kvantumaj fenomenoj, estas, same kiel la pretendoj de religio, "aspekto kiu transcendas tiun kiun la sensado kaj pensado rivelas." Tio estas grava eraro! Se oni malkovris kvantumajn fenomenojn, oni eltrovis ilin pere de metodoj kiuj plivastigis la sensadon. Plivastigitaj sensadoj, komence de la teleskopo de Galileo (kiun katolikuloj pretendigis instrumento de diablo) ĝis la ciklotronoj por studi subatomajn partikulojn, estas sensiloj tute nemisteraj kiuj servas por studi ankoraŭ ne tute komprenatajn fenomenojn, certe ne misterajn spiritismajn pretendojn de religio. La homa pensado kaj ilaro rivelas tiujn fenomenojn, do ili ne estas religie misteraj, kiel ofte pretendas religiuloj pri kvantumaj fenomenoj.

Moody diras ankaŭ ke, ĉar ni ne havas tute perfektan sciencon, ni ne povas aserti ke ĉiuj fenomenoj havas materiismajn kaŭzojn. Ĉu ni do forlasu la sciencojn, por aliĝi al religioj kiuj estas eĉ malpli perfektaj por klarigi la mondon? Ofte religiuloj diras, ke oni devas kunligi sciencistojn kun spiritistoj por havigi "tutan komprenon" pri la universaj fenomenoj. Tute ne! Religiuloj preĝis dum jarcentoj por pledi al misteraj spiritoj finigi la doloron de la homaro, sed, kontraŭe al la scienco kaj ĝiaj sukcesoj (ekzemple la forigo de variolo kaj aliaj malsanoj), religio neniam sukcesis mortigi eĉ unu bakterion (eĉ ne kompreni, kio estas bakterio!).

Li mencias ke multaj sciencistoj estas mistikistoj, sed tio ne signifas, ke scienco estas religio. Mistikismo, male ol tio, kion Moody skribis, ja estas danĝero ĉar ĝi proponas ke oni povas bazigi decidojn per neraciaj procedoj. Ankaŭ la nazioj opiniis same.

Kredo je Dio estas kaj neĝusta kaj neracia. Estas diferenco inter "vero" kaj "io pruvita kiel malvero." Religiuloj neniam pruvas ke Dio ekzistas, sed defias ke ni pruvu ke iliaj asertoj estas malveraj. La pruvo de malvero estas multe pli malfacila, kaj fakte estas multaj proponoj malveraj kies malverecon ni ne povas pruvi. Ĉu la vivo povas ekiĝi sen deveno de alia vivo, ekzemple? Tio estas falsa, kvankam ke oni ne povas pruvi ke nenie sur la larĝa globo iĝas vivo laŭ neviva mekanismo. Tio estis debato inter sciencistoj antaŭ du jarcentoj, kiu ilustras la principon: se oni proponas ideon, oni ne subtenu ĝin per manko da pruvoj ke la ideo estas malvera. Tio ne estas "sportema" en scienco!

Mi opinias ke, kvankam S-ro Moody asertas, ke li estas ateisto, li ankoraŭ havas mistifikajn pensmetodojn. Ankaŭ aserto pri iuj fenomenoj nedifinitaj per la ordinaraj sensoj estas nepruvebla, do pli proksime al malvero ol vero!

## **Dubo kaj Ateismo**, de Evlogi Dankov
tradukis Olga Cankova (Bulgario)

Dubo estas ĉefa nocio de la scienca ateismo. Sekve, ĝi postulas multfacetan prilumon. Jam R. Descartes konsideris la metodon de la dubo kiel "arkitekton" cele al nova homa kulturo. Liaopinie, finfine ĝi ebligus al homoj mastrumadi la naturon.

La du flankoj de la dubo -- religia kaj scia (epistemologia) -- gravas, ĉar nuntempe reliefiĝas jena tendenco: teologiigi la sciencon kaj sciencigi la religion.

Pro siaj pozitivaj kaj negativaj funkcioj la dubo ludas gravan rolon same en ateisma motivado kiel en la religio. Sed negative la dubo povas konduki al skeptikismo kiu proksimiĝas al agnostikismo (filozofia), dogmismo, k.s.

Ĉu la skeptikismo utilas al la celoj de la homa vivo?

Kvankam la filozofia skeptikismo estas historie eksmoda intelekta fenomeno, ĝi aktualas pro la problemo de ateismo.

El la du funkcioj -- pozitiva kaj negativa -- la unua prezentas seniluziigan faktoron, kiu permesas al ni apartigi la falsan kredon disde la vero. Sed tio eblas kondiĉe, ke ni kredas al io pli bona kiu ne kontraŭstaras la veron. Tial la pozitiva dubo senkatenigas la homajn fortojn kaj favoras liberan spiritan vivon.

Male, la negativa dubo kaŭzas skeptikismon, agnostikismon, kaj nihilismon. Skeptikismo siavice ofte kondukas al superstiĉoj.

Menciendas ankaŭ la morala skeptikismo (J.R. Bambrouth): ofte, je dilemaj ĉiutagaj situacioj necesigantaj elekton el pluraj alternativoj, ni dubas. Je tiuj kazoj oni elektas laŭ propraj moralaj motivoj, nekonforme al oficiala mondkoncepto kaj la publika opinio. Sed eblas, ke ankaŭ tiu morala skeptikismo transformiĝus en religion.

Necesas same diskuti pri la dubo kiel iaspeca kritiko aŭ kontraŭstaro al naiva konvinko aŭ superstiĉo. Ĉi-kaze dubo fariĝas kritiko kiu celas faciligi aliron al vero kaj instigi solvon de problemo. Tiusence la dubo funkcias al homa progreso kaj kontribuas al pliprofundigo de niaj scioj.

Memkompreneblas, ke la nihilista kritiko kies elirpunkto estas totala neado, malaprobas ĉies argumentojn. Tian "nudan kritikon" Lenin konsideris senutila. Li akceptis nur neadon kiel momenton de la evoluo, ĉar konserviĝas ĉio pozitiva.

La skeptikulo-nihilisto emas fariĝi dogmulo. Tiu pretas dubi antaŭ ol scio pri kio temas. Tiu dogmulo povas starigi religian pozicion, eĉ ŝajnigi sin "dio" kiu posedas kaj juĝas la veron. C.S. Peirce asertis, ke estus fatale, se tia skeptikulo havu absolutan arbitran rajton.

Evidentas, ke la anatomio de la dubo kaj ties prilumigo kontribuas al la esenco de la ateismo.

---

NOTO: Evlogi Dankov estas docento ĉe katedro Filozofio en Universitato Kiril kaj Metodij en Veliko Tarnovo, Bulgario, kaj donis permeson traduki ĉi tiun artikolon specife por *ATEISMO.*

## **Postkomentaro al Dankov**, de Ralph Dumain (Usono)

Koincide, mi ricevis la supran artikolon baldaŭ post ekverkado de artikolo mia kun titolo "La Dialektika Rilato inter Dubo kaj Scio" kiun mi eventuale publikigus se eble en revuo *Simpozio*. Des pli mi dankas pro ĉi tiu artikolo, kiu enkondukas gravegan filozofian temon. Prof-o Dankov absolute pravas, ke la dubo povas ludi pozitivan aŭ negativan rolon. Absolutisma, dogmisma skeptikismo, kiu neas la eblecon de racia kaj objektiva kompreno de la mondo, ofte ligiĝas kun promociado de religio kaj aliaj obskurantismaj doktrinoj.

En la bataloj inter la protestantaj kaj katolikaj apologiistoj dum la Reformacio kaj Kontraŭreformacio, la skeptikismon utiligis ambaŭ partioj de la debato. (Konsultu Richard H. Popkin, ***The History of Scepticism from Erasmus to Descartes*** [La Historio de Skeptikismo de Erasmo ĝis Kartezio]. Erasmo estis katolika reakciulo, kies kontraŭintelektismo kaj skeptikismo servis al papismo. Bedaŭrinde, UEA lastatempe eldonis tradukon de lia ***Laŭdo de l'Stulteco***.)

Descartes [Kartezio] mem utiligis skeptikismon al kontraŭdiraj celoj. Li uzis skeptikismon por evoluigi la sciencojn, kaj interalie kunfondis la mekanikan materiismon. Kontraŭflanke, li uzis skeptikismon por pruvi la ekziston de Dio.

En Britio, skeptikismo ligiĝis kun la filozofio de empiriismo, kiu komencis progreseme sed baldaŭ degeneris al la klerika obskurantismo de Berkeley. Interese, la revolucia "mistika" poeto William Blake estis pioniro pri la kompreno de la politika rolo de la brita empiriismo. Blake pensis, ke la filozofio de dubo estas ruza instrumento de la reganta klaso por manipuli la homamason.

Friedrich Engels prediktis, ke scienculoj sen konscienca filozofia materiismo, t.e. naivaj empiriistoj, facile malprogresus al spiritismo kaj la plej ridindaj superstiĉoj.

V.I. Lenin, kiun oni tute prisilentas en Usono kaj ne konsideras seriozan filozofon, profete komprenis la religiajn kaj politikajn sekvojn de ekstrema subjektivismo, skeptikismo, kaj mistifikado de la sciencoj mem, aparte pri la moderna fiziko. Post 60, 70, 80 jaroj, inundas la libromerkaton centoj da stultaj libroj pri qvantumfiziko kaj zenbudhismo k.s. Ni spertas similan fenomenon en Esperanto dankon al Albert Goodheir.

La Usona ido de brita empiriismo, eĉ pli degenera, estas pragmatikismo, ankaŭ nomita de John Dewey "instrumentismo." Tiu tendenco estas tre potenca, filozofie kaj politike, en la Usona "humanista" movado. Apartenis al tiu tendenco "humanisto" Sidney Hook, ekstrema dekstrulo kiu iam estis agento de McCarthy-ismo en la universitatoj. Paul Kurtz estas ege potenca -- tro potenca -- gravulo en la Usona kaj internacia humanistaj movadoj. Li estas adepto de Dewey kaj kunlaborinto de Hook. Li estas tre ruza kaj reakcia homo, iama mia profesoro kies manovrojn mi spertis en kaj ekster la klasĉambro. Li ankaŭ nomas sin skeptikulo, kaj estras skeptikisman organizon kiu kontrolas kaj kritikas parapsikologiajn aferojn kaj pseŭdosciencojn. Li nebule parolas pri scienca metodologio kaj la

neceso esti skeptika, sed li ne estas tute konsekvenca en sia elekto de skeptikindaj aferoj. Li kondamnas relative sendanĝerajn pseŭdosciencojn, ekz. astrologion, sed inter liaj "skeptikaj" kunlaborantoj troviĝas pluraj profesoroj-adeptoj de pseŭdosciencaj doktrinoj, ekz. la faŝisma pseŭdoscienco sociobiologio. Nu, liaspeca skeptikismo ludas difinitan politikan rolon.

Fine, mi menciu, ke ekzistas Usonaj revuoj kiuj temas specife pri ekstrema, eĉ paranoja, skeptikismo kaj publikigas la plej diversajn specojn de teorioj pri konspiroj kaj komplotoj, konceptoj pri la historio kaj realo, ktp. La kunlaborantoj en tiuj entreprenoj estas plejparte anarkiistoj, kun enmiksoj de adeptoj de ekstrema individuismo ("liberecismo," "laissez-faire"-a kapitalismo, doktrino de Ayn Rand), mistikistoj, kaj manpleno de kaŝfaŝistoj, inkluzive de almenaŭ unu subtila apologiisto de naziismo. Aferoj ĉi-tiaj ekzempligas la intelektan bankrotecon de anarkiismo.

Dum la ĵus fininta jardeko regas la plej cinika cinikismo, kiu respegulas la socian degeneron de la Reagan-a epoko kiu kongruas kun tia de la iama, panea Weimar-a respubliko. Kiel skeptikismo, cinikismo komence ludas senmistifikigan rolon sed la fina rezulto estas adoro al mensogoj kaj falsaĵoj.

Resume, dubo kaj skeptikemo havas relativan valoron kaj utilon, sed en abolutisma, dogmisma formo ili identas kun religia kaj filozofia dogmismo kaj kondukas al mistifikado, religio, nihilismo, kaj finfine al faŝismo.

## Kio Estas dio, aŭ Dio?, de May Bijleveld (Brazilo)

Mi ŝatus alian nomon por via revuo ol *ATEISMO*, ekzemple *LIBERA PENSO*, ĉar la vorto *ateisto* bezonas pli detalan difinon por intelektuloj. Ĝia signifo: "tiu, kiu neas dion" kaŭzas la demandon: "Kion ni neas? Kio estas dio, aŭ Dio?" En la mondo ekzistas multaj respondoj. Jen sekvas kelkaj el ili:

Dio estas:

1. La kreinto (kaŭzo) de ĉio.
2. La spirita gvidanto de nia Tero.
3. Por multaj kristanoj tiu gvidanto estas Jesuo, do por ili Jesuo estas Dio. Sed Jesuo havas/havis patrinon, do tiel li ne plu estas la unua kaŭzo.
4. Dio, la Patro en la ĉielo, sendis sian ununuran filon al la Tero. Do, ne plu estas Jesuo, sed la Patro, kiu estas Dio.
5. Kelkaj homoj diras: La Patro en la ĉielo estis eksterterano, kiu venis ĉi tien kaj gravedigis Maria-n, kiam ŝi estis dormanta, kun la intenco doni pli altnivelan teranon al ni por savi la homaron. Ĉu . . .
6. Dio kreis la homon laŭ sia figuro (aŭ imago?) kaj la homo pentras dion laŭ sia imago: kiel bela viro; tiel Dio estas antropomorfa, sed:
7. Dio estas ĉie. Li estas spirito, kaj "en spirito vi adoru lin." Do Dio ne havas korpon, devas esti nemateria spirito.
8. Dio amas, malamas, abomenas, aprobas, rekompencas, malaprobas, punas, volas esti amata antaŭ ĉio, ktp, do Dio estas antropomensa. Li eĉ ŝanĝas sian ideon kiam oni sufiĉe petegas.
9. La karaktero de Dio estas: saĝa, bona, amplena, helpema, par-

donema, ĉionscia, ĉionpova. Li decidas ĉion, direktas ĉion. Nenio okazas sen lia volo. Kial do okazas tiom da militoj kaj krimoj? Kaj kial krimuloj estas punataj, se ili krimis laŭ la volo de Dio?

10. Dio estas Amo.

11. Krom la spirita Dio (vidu 7) ekzistas la kreitaĵo = Universo. Do Dio plus la kreitaĵo: Dualismo.

12. La ĉiea senforma spirita Dio kaj la formiĝinta kreitaĵo estas *Unu*. Monismo. "La Regno de Dio estas en vi."

13. Dio estas Forto, Energio.

14. La unua perceptebliĝo de tiu Forto estas *Lumo*, ie je iu tre alta frekvenco de la spektro, kiu ĝenerale estas nevidebla.

15. Dio = la Tuto, nekomprenebla, neimagebla.

**Kio estas la Dio, kiun ni neas?** **Konkludo**: se neniu povas kompreni la Tuton, do ĉiuj pastroj kaj religioj estas nenecesaj. La konvinko posedi la absolutan *Veron* estas infana orgojlo.

* * * * *

Alia vorto, sen kies difino neniu povos saĝe diskuti, estas: *materiisto* = tiu, kiu kredas nur je la materio.

**Kio estas Materio?**

En la komenco de ĉi tiu jarcento la difino estis simpla: ĉio kio okupas spacon; aŭ, ĉio perceptebla per la sensoj.

Sed nun la kemiaj kaj fizikaj sciencoj rigardis iomete pli profunde, kaj ne plu klare vidas la diferencon inter materio kaj energio. Ĉu ĉiu materio estas densiĝinta energio? Ĉu ĉiuj elementoj konsistas el la samaj partikloj? Kaj ĉu la astronomoj malkovras tiujn samajn partikolojn kaj la saman energion en la tuta universo, je nemezureblaj distancoj? Ĉu ekzistas nur energio? Ĉu la universo estas nur unu Unuopo, kie ĉio rilatas al ĉio alia? Ĉu nia menso apartenas al tiu universala energio? Estas pruvita ke nia menso povas havi forton je granda distanco. Tio, kio transformas tiun latentan energion al aganta energio, estas la Penso. Do ĉu oni povus diri ke Dio estas pensanta energio? Sed kio estas *penso*? Do kia homo estas tiu materiisto, kiu nur kredas je la materio? Pli moderna ol la materiisto de 1900, ĉu ne?

Energio estas io tre reala, tre kapabla, eĉ kiam por ni neperceptebla. Rigardu nur vian ilon per kiu vi kontrolas vian TV je distanco. Metu vian manon antaŭ ĝi. Ĉu vi sentas ion? Tamen, tiu energio ekzistas. Ankaŭ nia menso estas reala energio, kiun ni devas ekzameni. Parapsikologio estas alia studenda tereno.

* * * * *

Mi estas liberpensanto. Mi tute ne kredas je antropormorfa aŭ antropomensa dio. Mi ankaŭ ne ŝatas ritojn kaj simbolojn. Sed mi estas konvinkita pri la unueco de la Tuto, de kio mi estas ero.

Ĝuste ĉar mi estas liberpensulo mi donas al ĉiuj la rajton esti libera laŭ sia maniero (ne nepre laŭ la mia).

Organizi liberpensantojn estas preskaŭ kontraŭdiro per si mem, sed veraj liberpensuloj ŝatas interŝanĝi ideojn. Tial mi deziris aliĝi al via organizo. ... Sed nun mi rimarkis ke por multaj homoj ateismo estas politiko. Tio ne interesas min, nek aliajn en mia ĉirkaŭaĵo. Mi naskiĝis en Nederlando. Nun mi loĝas en Brazilo. En ambaŭ landoj ekzistas religia libereco. Neniam iu devigis aŭ

dominis min. Neniu iam batalis kontraŭ miaj ideoj, kiuj, cetere, estas private miaj. Kaj neniam mi batalis kontraŭ aliaj pro ilia kredo. Lasu ĉiun kreski laŭ sia propra interna evoluo. Instruu sciencojn. Jen ĉio. La vivo instruos la ceteron. Permesu al ĉiuj esti feliĉaj kiel ili volas, se ... ili pro sia kredo ne agas kruele kontraŭ homoj aŭ bestoj.

Le religioj havas du flankojn: (1) filozofio pri la kaŭzo kaj destino de la Universo, regulata aŭ ne de dio(j); kaj (2) morala regularo. Por tiu lasta sufiĉas tri vortoj: *amo, honesteco* kaj *laboremo*.

## Kiu Konas la Esenojn?

de Ernst Diedrich (DDR)

Kiam mi ĉiutage estis en vivdanĝero kaj vidis mortadi miajn kamaradojn ĉirkaŭ mi, mi aliiĝis, kiel ĉiuj aliaj. Estis la jaroj 1941/42 antaŭ Moskvo. La kruela vintro jam estis la reala Blanka Morto. Kiom da germanaj soldatoj mortfrostis aŭ kripliĝis per la frostego, sen paroli pri sovetaj grenadoj kaj bomboj!

Ofte mi aŭdis la penson: "Kial la Kara Dio permesas tiom da suferado?" Kaj ni konstatis, iu Dio maleblas ekzisti. Mi ne vidis unu kamaradon, kiu kun doloregoj mortinta estis, ke tiu preĝis, vokis Dion. Ĉiu vokis la sanitariston. "Sani! Sani!" la lasta espero. Kaj fakte la kuracistoj kaj sanitaristoj per malegoista laborado savis multajn vivojn, sed ne Dio.

Je la 15-a de marto 1942 mi estis transportita kun aliaj vunditoj en lazareton kaj poste vivis en katolika lazareto Struldendorf apud Bamberg. Ofte mi marŝis tien, kiam mi jam kapablis iradi kaj regule eniris en malnovlibrejon, kie mi trovis interesajn librojn, ĉar la librokomercisto ne estis tiel idiota, por bruligi siajn valorajn librojn, kiam la sovaĝaj hitleranoj tion postulis. Bona librovendisto baldaŭ konas siajn klientojn, kiujn li prijuĝas laŭ la aĉetitaĵojn.

Tial li donis al mi kajeron pri la Esenoj. [Germ: *Essäer*; angl: *Essenes*.] La historia fakto de la Esenoj pruvas klare, ke la fama filo de Dio neniam vivis. Li estas kolektiva fantomo, konsistinte ĵus el la murditaj Esenoj.

Dum la jaro 70 la soldatoj de la Roma armeestro Titus estingis ribelon de la judoj kaj konkeris Jerusalemon (jam la duan fojon).

Laŭ la ordono de sia armeestro la soldatoj detruis la monaĥejojn de la Esenoj kaj murdis ilin.

Tio ne okazis pro la kredo, sed en la Esenoj komunumoj regis egaleco, frateco - per moderna vorto "komunismo".

En religiaj aferoj la Romanoj ĉiam estis grandanimaj, ĉar la kleraj, riĉaj sklavposedantoj ofte estis materiismaj filozofoj, kaj tial ne kapablis al iu ajn religio. La imperiestro Konstantin, kiu faris ŝtatreligion el la krista eklezio, mem estis liberpensulo, (dum 323) kiu mokis pri la kristanismo - tiom stranga por libere pensanta imperiestro.

Neniam la Romanoj estis tiaj sovaĝaj, sangosoifaj fanatikuloj kiel la kristanoj kaj islamanoj post ili. Tiuj plejparte disvastigis siajn kredojn "per fajro kaj glavo".

Al Roma filozofo kaj sklavposedanto la krista fanatikeco estis tial suspektinda pro ties malhela, kontraŭviva superstiĉo kaj pro la influado inter sklavoj, proletaro, kampa-

ranoj, do, inter la malriĉaj tavoloj. Ĝuste en tio konsistis la danĝero por la tuta sklaveco, kaj la prakristaneco dum la komenco estis reale revolucia.

Ĉu danĝero? Jes, en Romo vivis 1-1/2 milionoj da homoj, konsistante el 900000 sklavoj, 600000 liberuloj, liberigitoj, laborantaj civitanoj (metiistoj, ŝipistoj, ktp) infanoj, senhelpaj maljunuloj, almozpetantoj, ktp.

Do, nur maldikega, haŭtsimila tavolo regis la tutan imperion. (Kiel hodiaŭ!!)

Pro timo la estranta klaso dum kelkaj periodoj persekutis la kristanojn. La plej granda parto de la Roma historio estas sen iuj persekutoj ĝis Konstantin ja uzis la kristan religion kvazaŭ ideologian protekton de la sklaveca sociordo.

Cetere, en la grandega Roma imperio vivis tiom da strangaj, ridindaj religioj de centoj da popoloj kaj triboj, ke oni apenaŭ konsideris ilin. Ofte la religioj intermiksiĝis aŭ enigis Diojn en la latinan religion.

Do, ne la kristanismo forigis la sklavecon, sed la atakantaj ĝermanaj triboj kun la helpo de la sklavoj kaj plebejanoj, speciale dum la jaro 410.

Mi konsilas legi: Flavius Josefus: ***La historio de la Judea milito***; kaj H. A. Stoll: ***La kaverno apud la Morta Maro***. Tiuj materialoj estas konataj en la Vatikano. Ankaŭ multaj aliaj, kiuj estas kaŝataj tie. Tial la nuna pola papo scias pri ĉio. La hipokritulo scias, ke Kristo neniam ekzistis. Kaj krome jam multaj papoj antaŭ li estis nekredantoj.

La krima papo Aleksandro VI (1492-1502) el la familio Borgia iam konversaciis kun la itala princido Piko di Mirandola.

La opinio de la papo estis: "Ĉiu religio estas bona, sed la plejbona estas la plej stulta."

Kaj la papo plu: "Kiel Dio povas trovi plezuron je kredo? Ĉu vi ne nomas tiun, kiu diras tion, kion maleblas kredi, mensogulo?"

Kaj la princido timeme vokante kaj farante krucon: "Granda Dio! Ĉu Via Sankteco ne estas kristano?"

Kaj la papo: "Nu, honeste parolante, mi fakte ne estas. Sed se miaj kredantoj ne volus kredi, mi forbruligus ilin."

Vi trovos ĉi tiun kaj multajn aliajn interesaĵojn en la libro ***Pfaffenspiegel*** (***Pastraĉa Spegulo***) de Otto Korwin.

Dum la Bismarka periodo multaj Bebelanoj* posedis kaj fervore legis ĉi tiun kaj aliajn librojn de prof. Haeckel, Darwin, Bolsche, ktp. Por ne provoki la mimozajn ekleziojn oni, en GDR, ne reeldonas tiujn librojn. Kaj tamen ni estas akuzataj pro persekutado de la eklezioj. (Ni havas 36 diversajn religiojn en nia landeto.)

La plimulto da kredantoj marŝas kun ni kaj helpas konstrui socialismon. Eĉ en nia socialista partio estas eklezianoj. Kial tiom da kokokriaĉado pri ni en Imperialismujo, speciale en la FRG? La eklezioj volas eniĝi en niajn lernejojn. Kaj tie ni instruistoj kontraŭas; ni ne kapablas mensogi al niaj gelernantoj. Ni amas la infanojn.

Tial: ili estu liberaj!

---

* August Bebel, 1840-1913, germana socialista gvidanto.

## Pri la Internacia Ligo de Senkonfesiuloj Kaj Ateistoj

de Walter Schmidt (FRG), tradukis Maria Merla (Francio)

La nombro de senkonfesiuloj kaj ateistoj en la Federacia Respubliko de Germanio (FRG) kreskas. Ilia kvoto en la germana loĝantaro tutcerte superas 10%. Pri tio atentigis la Internacia Ligo de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj (ILSA) en Okcidenta Berlino en sia antaŭnelonge publikigita politika gvidlibro, laŭ kiu la nombro de konsciaj ateistoj mondskale estas proksimume 200 milionoj, al kiuj ĉiujare aldoniĝas proksimume 8-1/2 milionoj. Preskaŭ unu miliardo da homoj tute ne apartas al iu religio.

En la gvidlibro estas akre kritikitaj la du grandaj eklezioj en FRG. "La rajtoj kaj interesoj de la senkonfesiuloj kaj ateistoj estus ĉiam pli forte limigataj kaj malatentataj," kaj en la socia komunumo ili estas konsiderataj kiel duaklasaj homoj. Malgraŭ malkresko de kredo de siaj membroj la eklezioj pligrandigus pli kaj pli sian potencpozicion en la eksterekklezia mondo.

Pro tio ILSA postulas la forigon de la privilegio de eklezia imposto, forigon de religia instruado kaj de pastra agado en edukaj kaj sanigaj institutoj kaj en la armeo, kaj nuligon de sec. 166 de la krimkodo (pri blasfemo) kaj sec. 218 (pri abortado). La kristanaj eklezioj ĉiam kontraŭbatalis la naskolimigon kaj abortadon. Tiel ili uzas la ŝtaton por "respektigi sian koncepton pri moralo inter la tuta loĝantaro." Tiel la nekristanoj estus liveratai al la "diktaturo de la eklezie motivitaj kondutonormoj."

Plue, oni kritikas, ke senkonfesiuloj kaj ateistoj estas apenaŭ publike atentataj malgraŭ ilia kreskanata nombro. Tio ŝanĝiĝu. ILSA intencas pli kaj pli konsciigi pri la damaĝaj efikoj de la konfesia diktema enmiksiĝo en ĉiuj vivokampoj, montri "konfesiajn potencostrukturojn kaj postulojn je regado" kaj kontraŭstari ilin. ILSA kontraŭas la "manipuladon kaj subpremadon de bazaj liberoj kaj homaj rajtoj, aparte fare de la organizaj kaj instituciaj konfesioj." Laŭ ILSA, "realisma pritaksado de la sociaj cirkonstancoj nur eblas surbaze de racia pensado." ILSA opinias, ke dogmoj ne estas nerefuteblaj, kaj volas kontraŭagi dogmecajn manipuladojn.

ILSA celas aparte informi pri konfesia influado je klerigaj kaj informaj institucioj kaj komunikiloj. Laŭstatute, tiu kritikinforma agado inkluzivas bataladon kontraŭ rasismaj, ŝovinismaj, kaj aliaj ideoj kaj movadoj kiuj malrespektas homojn. ILSA sin nomas asocio sendependa de aliaj ideologiaj grupoj, partioj, ktp.

Laŭ informo de reprezentanto, ILSA havas en FRG 1200 membrojn kaj kunlaboras kun organizoj kun similaj celoj. ILSA celas pligrandigon de sia membraro al plukonstruo de politika forto por defendi la rajtojn de senkonfesiuloj.

Kvankam ILSA estis fondita je la 1-a de majo 1976, ĝiaj radikoj troviĝas je la komenco de la 1970-aj jaroj. La aktiveco ampleksas tri agadkampojn: kritiko de la religio kiel ideologio, kritiko de la socipolitika rolo de la eklezioj kaj religiaj komunumoj, kaj promociado de la rajtoj de senkonfesiuloj kaj ateistoj.

Gravaj diskutpunktoj estas (1) malkaŝo de kredobazoj, (2) kontraŭdiroj inter religio kaj scienco, (3) kontraŭdiro inter religiaj dogmoj kaj homa memdeterminado, (4) funkciado kaj psikaj rezultoj de religia edukado (inkluzive de manioj pri sorĉistinoj kaj ekzorcismo), (5) novformiĝo de religiaj sektoj, (6) religio kaj subpremado de virinoj, (7) religiaj radikoj de diskriminacio kaj persekutado kontraŭ religiaj, nereligiaj, rasaj, seksaj, kaj aliaj minoritatoj.

ILSA postulas abolon de ĉiuj konkordatoj kaj kontraktoj inter ŝtato kaj eklezio, malakceptas enkondukon de deviga instruado pri etiko aŭ io simila en ŝtataj lernejoj kiel alternativa instruado por tiu studentoj kiuj ne partoprenas en religia instruado. ILSA kontraŭas la jaman financadon de religiaj instancoj el impostoj, kiujn pagas ankaŭ eksterekleziuloj.

Alia ĉefokupo estas starigo de arkivo, esplorado, kaj konsilado pri eklezioj, sektoj, ideologiaj kaj religiaj komunumoj, kaj agadoj por religikritikaj kaj raciismaj ideoj. Tio okazas ĉefe per kvaronjara revuo (ekde 1976) ***Materialoj kaj Informoj pri Nuntempo – Politika Gazeto de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj.*** Tiucele servas ankaŭ la Biblioteko de Raciismo kaj Ateismo en la Internacia Libroservo de Senkonfesiuloj. Aktuale haveblas pli ol 200 verkoj, inkluzive de la serio "Club Voltaire" havebla nur per la libroservo.

Internacie, ILSA partoprenis plurajn ateistajn mondkonferencojn.

En revuo ***Materialen und Informationen zur Zeit*** (1/1989) aperis dupaĝa artikolo pri Esperantisto kaj liberpensulo Eduard Weichmann, kiu mortis en 1988. Weichmann estis aktiva en la laborista movado kaj longdaŭra membro de SAT, kies kongreso en Dortmund li organizis en 1959. Li testamentis multon el sia arkivo da publikaĵoj al ILSA.

---

POSTNOTO: Ĉi tiu artikolo originale aperis en revuo ***Evangelia Centro por Problemoj pri Mondkoncepto***, n-ro 5, 1989. Jen adreso de ILSA: Internationale Bund der Konfessionslosen und Atheisten (IBKA), Postfach 880, D-1000 Berlin 41; telefono ..49/30-826 61 52.

## Pri ATEO en la Monda Ateista Movado

Nia membro en Mauritius skribis: "Laŭ mi, la ĉefa rolo de ATEO estas fariĝi estonte la ligilo inter la diversaj ateistaj movadoj en la mondo. Oni ankaŭ povus ambicii fariĝi kvazaŭ-internacio de la ateistoj, kaj tiel ebligi facilajn rilatojn inter la diversaj landaj asocioj, samtempe servi kiel centro por diskonigo de tiuj diversaj asocioj."

Via prezidanto multe dankas pro tiu konsilo kaj jen respondas. Ni jam havas bonajn rilatojn kun la Internacia Humanistika kaj Etikista Unio (IHEU) en Nederlando, kies uzata lingvo estas la angla. IHEU jam, antaŭ la fondo de ATEO, disdonas informcirkuleron en Esperanto pri siaj celoj. IHEU jam invitis, ke mi verku artikolon (anglalingvan) pri ATEO por ĝia revuo. Tiel ni informos tutmonde. Mi opinias, ke ne estas realisma perspektivo konkurenci kun IHEU kaj similaj internaciaj asocioj aŭ konverti ilin al adopto de Esperanto. Tamen, ni celas laŭeblan kunlaboron kun IHEU k.a., kaj ni esperas provizi mankantajn

ĉenerojn de la internacia ateista reto. Ni jam pruvas, ke ni provizas utilan informservon kaj kunligas homojn, kiujn oni ne povus atingi aŭ kunligi per la angla lingvo.

## Alvoko Al Verkado Pri Specialaj Temoj

Multaj leteroj kaj artikoloj ricevitaj de la redakcio grupiĝas ĉirkaŭ kelkaj temoj. La ĉefredaktoro ekpensis, ke eble plaĉus al nia legantaro kaj helpus varbi novulojn, se ni dediĉus tutan aŭ almenaŭ duonon de unu aŭ pli numeroj de *ATEISMO* al specifa temo. Jen tri temoj konsiderendaj: (1) glasnosto, perestrojko, kaj religio en orienta Eŭropo, (2) kiel trakti etno-religiajn minoritatojn, aparte judojn kaj islamanojn en tradicie kristanaj socioj, (3) kiaj estu la kriterioj de dialogado inter ateistoj kaj religiuloj. Bonvolu respondi al ĉi tiu propono kaj menciu temojn, kiuj interesas vin. Laŭeble mem verku artikolojn aŭ tradukojn. Mi petas, ke enhavo estu sufiĉe specifa kaj substanca; bonvolu eviti ŝablonajn argumentojn kaj papagadon de ŝtata propagando.


**LAUTE!**
dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
(je 35 FF po jaro)
kaj
**SAT-BROŜURSERVO**
(interalie haveblas ateismaj verkoj)
**Enketu ĉe:**
**Cercle Amical Esperantiste de l'Agenais**
poŝtkonto 3371 74 M Bordeaux
F 47340 Laroque
Francio
(Ĉi tiu anonco reciprokas anoncon pri ATEO en *Laŭte*!)

**INTERNACIISTO**
**Kolektivo Esperantista Komunista**
Redaktas:
S-ro Franz Schick
Erzstrasse 11
A-8704 Leoben
Aŭstrio
(Ĉi tiu anonco reciprokas anoncojn pri ATEO en *Internaciisto*)


## Artikoloj, Kartunoj kaj Ŝercoj por Venontaj Numeroj

Evidente, ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuotajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en via lando. Ni deziras taŭgajn kartunojn kaj ŝercojn. **Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn baldaŭ!**

Ankaŭ, ni bonvenigos viajn leterojn pri *ATEISMO*, kaj ni penos respondi senprokraste.

**Vidu eksteran dorsan kovrilon por la estrara adreso!**

## Metodoj pri Jarpago de Abonkosto por 1990

---

**1. Pere de US$8.00 rekte al ATEO en Usono.** La plej bona rimedo estas sendo de ĉeko aŭ poŝtmandato, je nomo de "John B. Massen", kaj poŝtekspedu ĝin al: John B. Massen, 1525-A Day Avenue, San Mateo, CA 94403-1608, USA.

---

**2. Pere de UEA.** Se la supro ne estus por vi oportuna, mendu la abonon pere de la abonservo de Universala Esperanto-Asocio. Pagu 16 guldenojn:

al nederlanda poŝtbankkonto 378964 (Den Haag) de UEA, aŭ

per internacia poŝtmandato al UEA, Niewe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederland, aŭ

per eŭroĉeko . . sur la dorsa flanko de kiu nepre estu via kartnumero.

**Ne forgesu sciigi al UEA ke la pago rilatas al mendo de abono al *ATEISMO*, konto ATEO-Y de ATEO.**

---

**Se "P90" aperas post via nomo sur la koverto en kiu ĉi tiu numero alvenis, la Sekretario-Kasisto ricevis vian pagon por 1990.**

**Aliaj: BONVOLU PAGI LA ABONKOSTON TUJ, SE EBLE.**

---

**3. NE pagipovaj landoj.** Ni ne ĝis nun povas aranĝi metodon por pago. Tamen, ni sendos ATEISMO-n al ĉiuj kiuj petas ĝin.

---

## Perantoj de *ATEISMO*

**Britio:** Mark Palmer, 28 Westfield Road, Caversham, Reading RG4 8HH. Great Britain.

**Ni bezonas perantojn de aliaj landoj.**
**Bonvolu proponi vin mem al Sekretario-Kasisto.**

## La ESTRARO de ATEO
### Ateista Tutmonda Esperantisto-Organizo

**Ralph Dumain**, Prezidanto, Ĉef-Redaktoro, kaj Kun-Fondinto
1629 Columbia Road NW, Apt. 615, Washington, DC 20009-3651, USA
Tel: 202 - 332-0589

**Minerva Massen**, Vic-Prezidanto, Kun-Redaktoro kaj Kun-Fondinto
1525-A Day Avenue, San Mateo, CA 94403-1608, USA
Tel: 415 - 345-0143

**John B. Massen**, Sekretario-Kasisto kaj Eldonisto
(Vidu supre por Minerva.)

**Manuskriptoj**

Ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en multaj landoj.

Bonvolu sendi manuskriptojn al Minerva Massen, preferinde tajpitajn kaj kun duoblaj-spacitaj linioj. Konservu ĉe vi kopion de via manuskripto.

Aŭtoroj rajtas uzi pseŭdonimojn. Ni senhezite akceptos tradukojn el klasikaj aŭtoroj kie ne ekzistas kopirajta problemo. Pri kopirajthava materialo, provu gajni permeson de la aŭtoro aŭ eldonisto kaj sendu al ni kopion de la skribita permeso.

Ni NE akceptos porreligian propagandon por nia revuo.

**Korespondado kaj Informpetoj**

Vi rajtas kontakti iun ajn estraranon. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekutadon pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn apartajn aranĝojn por vi. Se vi skribas permane, bonvolu skribe klare, aparte vian adreson.